

ISSN: 0827-3154


2008/2

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

aŭtuno/vintro 2008

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

LUMO



Sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto en Montrealo: Granda sukceso !

Lumon eldonas dufoje en jaro KEA, 6358-A rue de Bordeau, Montréal (QC) Kanado H2G 2R8
Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association
Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Unu el la plej bone organizitaj Esperanto-kongresoj de Nordameriko (P. Hopkins).....	3
Antaŭkongresa ekskurso tra Kebekio (N. Fleury).....	6
Rezolucio de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto	7
Rete ludu kun esperantistoj tra la mondo (N. Fleury)	7
Raporto pri raportoj pri TAKE 7 (N. Fleury)	8
Solvo de la enigmo « Kiu posedas la zebrojn? » (A. Simon)	8
Oficialaj anoncoj:	
Plialtigo de la kotizo por dumviva membreco	9
Nova dissendo-listo por anoncoj pri la kanada Esperanto-movado.....	9
15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (N. Fleury)	10
Kluba Agado: Toronto (K. Price)	11
La urbestro de Bjalistoko en Montrealo! (Jérôme Frédéric Bouchard)	12
Zamenhofa festo en Kalgario (psh).....	12
Nicole kaj Pierre vojaĝis en Kanado (R. Porter)	13
Nia krucvort-enigmo (D. Reble).....	14
Novskotia renkontiĝo (A. Simon)	15
Kvazaŭ-recenzo de nelastatempa libro: <i>Konsolo de la filozofio</i> de Boecio (G. Greatrex).....	16
Letero al la redaktoro (Y. Bellefeuille).....	17
Franca skribo inspirita de Esperanto (Mario Périard).....	18
Redaktora angulo	18
Abonu al <i>Monato</i> kaj <i>La Ondo de Esperanto</i>	19
Kalendaro:	
Regulaj kunvenoj en Kanado	20
Esperanto-eventoj 2009	20

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 200

Redaktis : Paul Hopkins

Provlegis : Yves Bellefeuille, Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson

Presis kaj distribuis : Yves Bellefeuille

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligas plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.


SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2009, BV. FARI TION NUN!

Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por \$30 al

Kanada Esperanto-Asocio

p/a Yves Bellefeuille, kasisto


2372 Haddington, Ottawa (ON) K1H 8J4



Unu el la plej bone organizitaj Esperanto-kongresoj de Nordameriko

Post progame riĉa antaŭkongreso en Tri-Riveroj kaj Kebeko (vidu p. 6), la 12-an de julio (2008) ekis tio, kion iuj nomas la plej bone organizita Esperanto-kongreso de Nordameriko (krom la multe pli grandaj Universalaj Kongreso de Portlando kaj Vankuvero). Samtempe okazigis siajn jarkunsidojn Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio, do iusence okazis tri kongresoj en unu.

Aliĝis al la kongreso 223 homoj el 24 landoj, el kiuj 193 kongresanoj sukcesis alveni. La plimulto de la kongresanoj venis el Kanado (unuavice Kebekio sed kun forta reprezentigo ankaŭ de Ontario, Alberto kaj Novskotio) kaj Usono, sed ankaŭ venis nombre fortaj grupoj de Meksiko kaj Kubo. El ekster-amerikaj nacioj plej forte reprezentigis rusoj kaj francoj.




La ĉeftablo dum la malferma kuveno de TAKE 7

La programo komenciĝis vespere de la 11-a per bonveniga vespero en la kafejo Sanguinet flanke de la kongresejo, la sidejo de la Universitato de Kebekio ĉe Montrealo (UQÀM), en kies apuda studenta loĝejo ankaŭ tranoktis la plimulto de la kongresanoj. La sekvan matenon okazis la oficiala malfermo de la kongreso, dum kiu bonvenigis la kongresanojn prezidantoj de Esperanto-USA (Phil Dorcas), Kanada Esperanto-Asocio (Normand Fleury) kaj la Amerika Komisiono de UEA (Maritza Gutiérrez González); ankaŭ salutis la kongreson UEA-estraranoj Hori Yasuo kaj José Antonio Vergara, kaj estis legita la oficiala


salutmesaĝo de la Brazila Esperanto-Kongreso samtempe sesianta en tiu sudamerika lando, kiu konfirmis la inviton por okazigo de la oka TAKE en Brazilo.

Post la malferma kunveno okazis grupa fotado (vidu la kovrilon), tagmanĝado en plej diversaj restoracioj de la kvartalo, kaj jarkunvenoj de Esperanto-USA kaj Kanada Esperanto-Asocio. Dum ĉi-lasto, ĉ. 20 membroj de KEA kaj kvin eksterlandanoj aŭskultis prezenton de la prezidanto de KEA pri la agado de nia asocio kaj mallongan raporton de la redaktoro de *Lumo*; poste ili povis starigi demandojn kaj prezenti proponojn.

Tiun vesperon okazis la unua el multaj vesper-



Normand Fleury prezidas la jarkunvenon de Kanada Esperanto-Asocio




JoMo ĉi-jare koncertis dum TAKE kaj UK

spektakloj de TAKE. Dum la kebekia vespero (sabaton) ni spektis kaj aŭskultis tri grupojn prezentantaj diversajn aspektojn de la kebekia kulturo: unue la virinoj de *L'esprit des Vents* mirigis nin per tamburado kaj kantado sintezanta indiĝenan kaj modernan muzikon, sekve *Les Danceux* prezentis tradician kebekiajn dancojn kaj muzikon, kaj fine la indiĝena bando *Anishnabe* oĝibve dancigis la kongresanojn ĝis malfruaj horoj. La dimanĉan vesperon komencis akcepto sub patronado de Esperantic Studies Foundation, pri kies agado kaj planoj raportis al ni direktoro Mark Fettes. Sekvis bankedo, sen-vianda por multaj kongresanoj, kaj plurlingva koncerto de franca kantisto JoMo, kiu ravis kaj dancigis nin per sia mult-lingva repertuaro. Lundo finiĝis per la latina vespero, dum kiu prezentiĝis dancoj de talentaj meksikaj esperantistoj kunportintaj siajn kostumojn al Montrealo, de perua danc-ensemblo, kaj la sudamerika-afrika ensemblo *Afrique en Mouvement*, plus kantado de la kuba esperantisto kantisto Julián Hernández Angulo kaj aliaj. Mardo estis la vespero por elmontrado de esperantistaj talentoj: la Esperanta vespero. Komence nin ĉarmis la amuza kaj pensiga kantado de Benĉjo, nova talento usona ĝis nun aŭdita nur dum ARE, sekvis plia kantado de kuba talentulo Julián, kaj finis la programon la verva, nereteneble poliglota kaj nepre danciga JoMo.




Meksika esperantistino prezentas tradician dancon dum la latina vespero

Kompreneble, kongresanoj ne nur amuziĝis dum TAKE 7. Diskutado pri la kongresa temo „Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj“ ekis dum la dimanĉa inaŭgura kunsido, dum kiu prof. Humphrey Tonkin festparole instigis la kongresanojn labori por „rekrei nian organizaĵon antaŭ la novaj tempoj“ kaj emfazis ke „Zamenhof trans-



Panelo diskutas pri indiĝenaj rajtoj donis al ni la eblecon krei nian propran kulturon“. Pliaj diskutoj pri la kongresa temo okazis dum la semajno, fine rezultigante la kongresan rezolucion (vidu p. 7). Kiel en ĉiu iom pli granda Esperanta kongreso ankaŭ estis diversaj ekstertemaj prelegoj – Thomas Eccardt parolis pri raciigo de la Esperanta nomigado kaj Paul Hopkins pri la nomado de kanadaĵoj en Esperanto – estis kursoj pri farado de artaĵoj, instruado de spirita dancado, kaj rakontado. Multaj estis kortuŝitaj de la komuna „kunveno“ kun partoprenantoj de la Brazila Esperanto-Kongreso



Prof. Thomas Eccardt parolas pri malfacilaĵoj de nomado en Esperanto


kiun ebligis interreta ligo kaj projekciado en la ĉefa salono de la kongreso: partoprenantoj de la du kongresoj komune kantis la Himnon.

Kongresanoj ankaŭ havis multajn eblecojn konatiĝi kun la gastiganta urbo Montrealo. Matene de la ekskursata tago (mardo), kongresanoj povis senpage partopreni gviditan ekskurson al la TOHU, kie troviĝas la granda cirka komplekso de Montrealo (monda sidejo de la fama *Cirque du Soleil*), kaj la Media Komplekso Saint-Michel, la plej granda centro por reciklado kaj reuzado de urbaj rubaĵoj en Nordameriko. Montrealaj esperantistoj ankaŭ proponis gviditajn ekskursojn al Malnova Montrealo kaj la Reĝa Monto (Mont Royal).



Kongresanoj sur Reĝa Monto

(Mont Royal).



La aŭtoro kaj Lorne Erickson en la kongresa libroservo

Alveninte al la kongresejo, ĉiu nov-alveninto venis al la LKK-ĉambro por ricevi siajn dokumentojn. Tie ankaŭ troviĝis servo grava por ĉiu legema esperantisto: la Libroservo. Dank' al tio ke TAKE 7 okazis en la urbo kie estas ankaŭ la Libroservo de KEA kaj la nova Biblioteko de KEA, kongresanoj povis elekti ne nur inter multaj novaj libroj sed ankaŭ inter multaj brokantaĵoj (iuj alportitaj okaze de la kongreso, ekzemple de la ĉi-jare disiĝinta Memorbiblioteko Dorothy Hawley en Kalgario). Enspezoj de la vendado de la brokantaĵoj donaciĝis al la Amerika Komisiono de UEA, kaj tiel kongresanoj povis havigi al si raraĵojn je malalta kosto samtempe helpante al la progresigo de Esperanto en la Amerikoj.

Por ĉi tiu laŭdinda laboro ni dankas la invitintojn de TAKE 7, Esperanto-Societo Kebekia kaj Esperanto-klubo-UQÀM, kaj ties Lokan Kongresan Komitaton: ne povante adekvate taksi la kontribuojn de ĉiuj kunlaborantoj, mi nur atentigas ke ĉiujn nomojn oni trovas ĉe la reta paĝo <http://www.take7.ca/kontakto.html>. La gazetara laboro de la LKK rikoltis grandan eĥon ĉe la kanadaj amaskomunikiloj (vidu p. 8): dank' al tio, centmiloj da nordamerikanoj aŭdis pri nia lingvo, kio sendube efikos favore je nia laboro por progresigi Esperanton.

— Paul Hopkins

Libroservo : Speciala oferto por librotago 2008

Okaze de la tago de la Esperanto-libroj, la 15a de decembro, la Libroservo de KEA pagos la poŝtajn kostojn. Do, se vi mendos, inter la 15a de decembro kaj la 15a de januaro, ion ajn el la katalogo de la Libroservo de KEA, ni ne aldonos pliajn poŝtajn kostojn.

Notu ke tiu oferto estas nur por la membroj de KEA kaj nur por sendado ene de Kanado. Profitu la okazon kaj bonan legadon!

<http://www.esperanto.qc.ca/katalogo/>

Antaŭkongresa ekskurso tra Kebekio


Antaŭ TAKE 7 okazis kvar-taga ekskurso tra Kebekio, de la 7-a ĝis la 10-a de julio 2008. Nur ok personoj aliĝis, sed mi ne bedaŭras tion, ĉar kiel gvidanto, estis pli facile okupiĝi pri malgranda grupo, kaj cetere la etoso estis tre amika, eĉ familia en la senco de internacia familio, ĉar kun-partoprenintoj estis el Francio, Italio, Meksiko, Usono kaj Kanado.

Ni unue vizitis Odanak-muzeon pri abenakoj. La muzeaj gvidantoj miris je la multnombraj demandoj de la esperantistoj pri la abenaka lingvo kaj kulturo.

Posttagmeze ni alvenis en Tri-riveroj kaj vizitis la muzeon pri popola kulturo de Kebekio. Ni ĝuis resti ene, ĉar ekstere la temperaturo superis 30 gradojn kun forta suno kaj humideco. Post la muzeo, ni rekte veturis al Kebeko sen piediri tra la malnova urbo.

Do, vespere ni alvenis al Wendake, indiĝena komunumo norde de Kebeko. Tie vivas la ŭendatoj (huronoj), ekonomie vigla indiĝenejo sed kun malaperinta lingvo. Ni dormis en du familiaj gastejoj ĉirkaŭitaj de indiĝenaj objektoj.

Mardon matene, post bongusta hejmeca maten-manĝo, ni iris al Wendake-muzeo pri huronoj. Temas pri plej moderna ekspoziciejo kiu bonege prezentas la huronan kulturon. La juna indiĝena gvidanto ne nur gvidis nin tra la muzeo sed ankaŭ al loka historia ligna kapelo, al historia domo kie vivis indiĝenaj estroj kaj famuloj en la pasinteco,



Kebeko de la rivero

kaj fine al akvofaloj. Ĉiuj vere ĝuis la viziton kaj piediradon tra la malnova parto de Wendake. Posttagmeze ni iris al la malnova kvartalo de Kebeko kaj piede malkovris ĝian historion. Post la vespermanĝo kun tipaj pladoj de la regiono ni spektis la mirindan noktan multmedian spektaklon pri la 400-jariĝo de Kebeko.

Bedaŭrinde, pluvegis merkredon matene, do la plano ŝanĝiĝis, kaj ni vizitis la kebekian parlamenton anstataŭ piediri en la urbo. Vizito de muzeo pri civilizacioj estas nepraĵo en Kebeko. Eblis esplori ses diversajn ekspoziciojn dum pluraj horoj.

Ĵaŭdon ni forlasis Kebekon kaj atingis Drummondville, kie troviĝas historia vilaĝo. Temis pri tuttaga vizito por esplori la plurdekojn da domoj, metiejoj kaj aliaj konstruaĵoj el pionira epoko. Aparte interesa estas ke homoj vivas en tiuj domoj, epoke vestitaj, kaj kuiras, babilas kun vi aŭ prilaboras ion.

Mi finu dirante ke mi ĝuis gvidi la grupon, ĉar mi mem lernis multon dum la ekskurso kaj la etoso estis vere amikeca.

— Normando Fleury

Rezolucio de la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

LA SEPA TUT-AMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO, okazinta en Montrealo, Kanado, de la 12-a ĝis la 18-a de julio 2008,

Funde studinte la kongresan temon « Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭriva evoluigo en la Amerikoj »,

Ekzameninte la tri diversecojn ekosisteman, lingvan, kulturan, la rilatojn inter ili kaj la gravon de ĉiu el ili por la pluvivado de la homaro, almenaŭ je sia nuna vivnivelo, en la baldaŭa estonteco,

Aŭskultinte la zorgojn pri la konservado de la triopa diverseco ekosistema, lingva, kultura esprimitajn interalie de kvar reprezentantoj de amerikaj indiĝenaj popoloj,

Eksperimentinte pri la efika uzado de novaj teĥnikaj rimedoj por faciligi vastdistancan interkomunikadon en esperantujo,

Diskutinte la neceson por la esperantujaj organizoj ĉiunivelaj malfermi sin je etika kunlaborado kun neesperantistaj alternativmondaj organizoj,

PROPONAS plu studi kaj studigi tiun problemaron diskonigante la detalojn de la dumkongresaj intertraktadoj kaj eklernoj, notinde

- per publikigo de prikongresa dokumento kiu servus kiel gvidilo por plua konkreta agado kaj eksperimentado,
- per kreo de interreta Interamerika Kolegio traktanta tiun problemaron en maniero ĝenerale alirebla.

Rete ludu kun esperantistoj tra la mondo

Mi hazarde malkovris tiun retan ludon kaj vere ŝatas ĝin. La reguloj simplas; vi bezonos du minutojn tage kaj eble lernos novajn vortojn. La ludo nomiĝas 'Samopiniuloj'.

Samopiniuloj estas simpla ludo. Ĉiutage aperas nova vorto kaj vi devas trovi 8 vortojn, kiuj rilatas al tiu vorto sed kiuj ne enhavas la saman radikon. Ekzemple, se aperas la vorto "luno" vi rajtas proponi : suno, eklipso, Armstrong, astro, satelito, astronomio...

Vi ne rajtas proponi "lunarko" aŭ alian vorton kiu enhavas tiun radikon.

Aliflanke, vi ja rajtas proponi vortojn kun la sama radiko, se tiu radiko ne estas en la vorto de la tago. Ekzemple, vi rajtas proponi "paroli" kaj "parolo" kaj "parola": por la ludsistemo temas pri tri malsamaj vortoj. Same "parolo" kaj "paroloj" estas konsiderataj esti malsamaj vortoj.

Se vi volas kunludi, vizitu: <http://samopiniuloj.esperanto-jeunes.org/index.php>

— Normando Fleury



Ludema Normando

Raporto pri raportoj pri TAKE 7

Mi aktivas en la kebekia Esperanto-movado de 1983 kaj neniam vidis tiom grandan interesiĝon de la amaskomunikiloj pri Esperanto. Vere post la aperigo de mallonga artikolo dulingva, verkita de Boris (Boris-Antoine Legault) kaj dissendita tra Kanado pere de la komerca servo « Market Wire », tuj ekestis vigla reago de ĵurnalistoj tra Kanado. Helpis al tio la fakto ke la Kanada Novaĵagentejo (Presse canadienne/Canadian Press) verkis kaj dissendis longan artikolon pri la kongreso. Uzis tiun informon diversaj gazetoj tra la tuta Kanado. Estus malfacile listigi ĉiujn artikolojn kaj intervjuojn, ĉar ili estis vere multnombraj, kaj Boris dronis dum-momente sub la petoj kaj telefonvokoj de ĵurnalistoj. Mi volas gratuli Borison por tiu grandega sukceso, ĉar nun miloj da Kanadanoj aŭdis denove pri la ekzisto de Esperanto kaj ke ne temas pri projekto kiu iam malaperis.

Artikoloj en gazetoj :

Presse canadienne / Canadian Press, *Le Devoir* (Montrealo), *Ottawa Citizen*, *Mirror* (Montrealo), *The Gazette* (Montrealo), *Calgary Herald*; kaj multaj aliaj!

Artikoloj en retejoj :

Reuters.com, matin.qc.ca, cyberpresse.ca, agendapublic.net, grandquebec.com, findarticles.com, frimmin.com, kaj tre multaj aliaj.

Radio-elsendoj :

Radio-Canada Montréal (elsendoj *l'été et rien d'autre*, *Émissions culturelles*, *Sans détour*, k.a.), Radio Ville-Marie Montréal, *Radio Noon* de CBC Montreal, National Public Radio (Usono), CIBL Montréal, *The Current* de CBC Montreal, CFMB Montréal, Radio-Canada Québec (*Retour sur le monde*), Chorus FM Montreal, Radio-Canada International (france, angle, hispane, portugale), kaj tiel plu ...

Fakte, kiam mi tajpis ĉe Google "Esperanto montreal" mi trovis multajn aliajn retejojn kiuj raportis pri la kongreso, en Kanado kaj ankaŭ en Usono.

— Normand Fleury

Solvo de la enigmo "Kiu posedas la zebbron?"

Je paĝo 17 de la numero 2007/01 de ĉi tiu revuo *Lumo* publikigis enigmo sub la titolo « Kiu posedas la zebbron? ». Oni anoncis ke la solvo aperos en la sekva numero, sed la gastredaktoro de la sekva numero ne rimarkis tion. Sekve, ni nun anoncas ke la solvo estis:

La ĉino posedas zebbron, kaj la italo trinkas akvon.

La unua solvinto, kiu sendis sian solvon al la enigmo-verkinto (Allan Simon), estis **Justin Dessureault** de Boisbriand (QC), sed pro tio ke sinjoro Dessureault jam estas dumviva membro, la premion (unu-jara abono al *Lumo*) ricevos la dua solvinto **Kevin Arthur** (adreso nekonata). Gratulojn al ili !

OFICIALAJ ANONCOJ

Plialtigo de la kotizo por dumviva membreco

La estraro de KEA sentis la devon multe altigi la dumvivan kotizon. Kial do?

Kiam iu pagas dumvivan kotizon, la kotizo devas esti sufiĉa por kovri la kostojn de sendado de *Lumo* al tiu membro dum lia tuta vivo. La kotizo ankaŭ devas ebligi al KEA informi pri Esperanto kaj instrui ĝin, helpi renkontiĝojn kiel TAKE, kaj fari aliajn utilajn agadojn.

La dumviva kotizo estis dekoblo de la jara kotizo. Tio signifas, ke KEA devis esti kapabla investi la kotizon tiel, ke KEA povos ĉiujare, dum la vivo de la membro, ricevi, de la rentumo kaj de la kapitalo, sumon kiu egalas al la normala jara kotizo.

Je tiu nivelo, la dumviva kotizo tute ne estis sufiĉe alta por ke eblu ricevi de ĝi jaran kotizon ĉiujare, eĉ kun la plej lerta investado. Ju pli da membroj pagis dumvivan kotizon, des pli da mono KEA fakte perdis. Kompare, ĉe UEA, dumviva kotizo estas 25-oblo de jara kotizo. Tiel la dumviva kotizo ja povas kovri la kostojn de la servoj kiujn la dumviva membro ricevos.

Per la altigo de la dumviva kotizo, KEA ne celas havi grandan financon avantaĝon de dumvivaj membroj. Ĝi nur celas, ke la dumviva kotizo sufiĉu por pagi la servojn kiujn tiuj membroj poste ricevos dum multaj jaroj.

Daŭre estos rabatita kotizo de \$10 jare, kio estas vere malmulte, kaj espereble ebligas ke iu ajn povu aliĝi al KEA kaj subteni nian agadon, sendepende de ties financa situacio. Kaj kompreneble daŭre validos la dumviva membreco de tiuj kiuj antaŭe pagis dumvivan kotizon.

Yves Bellefeuille
kasisto de KEA

☆☆

Nova dissendo-listo por anoncoj pri la kanada Esperanto-movado

KEA kreis interretan dissendo-liston por anoncoj pri la kanada movado. La listo estas "filtrita" (aŭ "moderita"), kaj nur mesaĝoj kiuj rilatas al la movado en Kanado estas akceptitaj. Aperas ekzemple informoj pri renkontiĝoj, pri kursoj, ktp.

Por aboni, sendu mesaĝon al la ret-adreso < anoncoj-request@esperanto.ca > kun la tem-linio ("Subject") "subscribe", aŭ iru al la hejm-paĝo de la listo:
http://esperanto.ca/mailman/listinfo/anoncoj_esperanto.ca

Por sendi mesaĝon al la listo, sendu ĝin al la ret-adreso < anoncoj@esperanto.ca >

15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

En 2008, mi estis aparte okupita ne nur pro tio ke mi aktivis en la kongresa komitato de TAKE 7 sed ankaŭ poste, ĉar mi estis la ĉeforganizanto de la 15-a ARE.

ARE estas simila al NOREK sed mi diru, por simpligi la aferon, ke NOREK estas regiona Esperanto-semajnfino kiu okazas ĉe la pacifika flanko, dum ARE okazas ĉe la nord-atlantika flanko de la kontinento.

Mi aparte fieras ke ni atingis la 15-an ARE kaj ke sume ĝin partoprenis 701 personoj el 9 landoj de 1993 ĝis 2008. La plej malgranda nombro da partoprenintoj estis 22 kaj la plej granda estis 64, do meze 48 personoj partoprenis la renkontiĝon.

Kion ni faris en 2008? Ronald Glossop instruis al komencantoj kaj prelegis pri « La signifo de la 21-a jarcento ». Okazis ankaŭ prelegoj de Francisko Lorrain pri « Pitagoro kaj lia teoremo », de Parker Glynn-Adey pri « Esperanto ne estas lingvo », de Njil Blonstein pri « Historio de la UEA-oficejo en NY », kaj de Steve Brewer pri « Esperanto : Altern-reala ludo aŭ ŝminkita porko ».



Gejunuloj kune manĝas en junulejo dum la 15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto



Partoprenantoj de la 15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

Partoprenantoj de la 15-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

Krome Zdravka Metz zorgis libro-bazon kaj gvidis la oratoran kaj literaturan horojn. Mi amuzis la partoprenantojn dum la amikeca vespero kaj gvidis la tradician kulturalan vesperon.

Mi pensas ke ARE estas grava aranĝo pro tio ke ĝi ebligas al komencantoj sperti ke Esperanto estas vivanta lingvo, ebligas amikumadon inter esperantistoj el Kanado kaj Usono kaj donas al gejunuloj (pli ol 15 en 2008) la eblecon kune kuiru, amuziĝi kaj amikiĝi dum tritaga semajnfino.

Mi pensas ke ARE estas grava aranĝo pro tio ke ĝi ebligas al komencantoj sperti ke Esperanto estas vivanta lingvo, ebligas amikumadon inter esperantistoj el Kanado kaj Usono kaj donas al gejunuloj (pli ol 15 en 2008) la eblecon kune kuiru, amuziĝi kaj amikiĝi dum tritaga semajnfino.

Vivu ARE kaj bonvenon en 2009! Serĉu pliajn informojn ĉe la retejo: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/are>

— Normando Fleury

Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto

Kluba agado: Toronto

En julio sep torontanoj partoprenis la Tut-Amerikan Kongreson en Montrealo kaj tre ĝuis ĝin. Estis agrable renkonti malnovajn geamikojn, aŭ konatiĝi kun novaj, el foraj partoj de nia propra lando – ‘de oceano al oceano’ – krom kun tiuj el Usono, Kubo kaj aliaj landoj. El Vankuvera Insulo venis Wally DuTemple, kaj el apud Halifakso, Kim Keeble kaj Bob Williamson. Rare ni havis okazon renkonti esperantiston el Saskaĉevano, sed mi havis la plezuron lunci kun Lorne Erickson el tiu provinco.

Mi aparte mencias tiujn, ĉar ni torontanoj havas okazon renkonti esperantistojn el la pli ‘proksimaj’ urboj Montrealo kaj Otavo preskaŭ ĉiujare dum MeKaRo, la vaganta MezKanada Renkontiĝo, kiu en 2009 okazos en Toronto dum la longa Viktoria semajnfino, de la 23-a ĝis 25-a de majo.

Tuj post la finiĝo de TAKE, tri el la torontanoj flugis al Roterdamo por partopreni la Universalan Kongreson. Dume Lunjo invitis esperantistojn al rostfestoj en sia ĝardeno la 2-an de aŭgusto. Karlina kaj Arono el Vankuvero, konataj pro siaj podkasto de Radio Verda, partoprenis kiel ankaŭ Argilo kaj Benjamen el Otavo. Parker Glynn-Adey venis el Peterborough, kaj de pli proksime,



Torontaj geesperantistoj kun gastoj rostfestas ĉe Lunjo (meze) en Scarborough (fotis: Arono)

Mateo Chisholm kaj Jay el Hamiltono.

La 2-an de septembro, tri jarojn post sia lasta vizito, Bill Mak ĉeestis nian kunvenon en kafejo. Fine de tiu semajno li ankaŭ venis al la unua biblioteka kunveno de la sezono, en la hejmo de Detlef. Aliaj vizitantoj en septembro estis Anna Maria Danell el Svedio kaj Helmut Bludszuweit kun edzino Hergund el Germanio.

☆☆☆☆☆☆

Soroosh Vafapoor, studento pri farado de mallongaj nefikciaj filmoj, antaŭ kelkaj monatoj petis permeson filmi dum nia kunveno en la kafejo. Ni konsentis, sed dum posta redaktado de la filmo evidentiĝis ke lia mikrofono ne taŭgis por loko kie estas ĉirkaŭa bruo, kaj li ne povis uzi plimulton de la registrita materialo. Bonŝance, li ankaŭ akceptis inviton viziti Detlef pli malfrue en la semajno por vidi la kluban bibliotekon. La intervjuo tie fariĝis la plej granda parto de la filmo kiun li proponis al la gvidanto de la filmprojekto. Ĝi estis unu el tri filmoj elektitaj por esti montritaj al invititoj en novembro.

Enkondukis la prezenton unu el la enscenigistoj por Discovery Channel, kiu gvidis kaj helpis la malgrandan grupon de novaj filmistoj dum ilia projekto. Tiam filmsona specialisto kiu prizorgis la sonon de filmoj kiel *Star Wars* demonstris la diferencon inter la ‘kruda sono’ originale registrita kiam oni filmis tian hollywoodan filmon, kaj la sonon post pritraktado en la filmo kiun oni prezentas al la publiko.

La sep-minuta filmo de Soroosh estis la lasta el tri filmoj montritaj. Ĝi estis informa kaj pensiga dank’ al la intervjuo kun Detlef, kaj estis bone ricevita de la spektantaro. Kvin esperantistoj estis inter la invititoj kiuj ĉeestis la prezentadon en konstruaĵo de Universitato Ryerson.

— Ken Price

La urbestro de Bjalistoko en Montrealo!

(el *La Riverego* n-ro 91, marto 2008)

Je la fino de januaro, Esperanto-Societo Kebekia ricevis retmesaĝon de la konsulo de Pollando, kiu invitis montrealajn esperantistojn, polojn kaj entreprenistojn renkonti la urbestron de Bjalistoko, sinjoro Tadeusz Truskolaski. Vi certe scias, ke Bjalistoko estas la naskiĝurbo de Zamenhof.

La 6-an de februaro 2008 vespere, mi iris al la pola konsulejo vestita per miaj plej belaj vestaĵoj por tiu etiketa vespero. (Tamen mi lasis hejme mian kravaton!) Mi estis iomete ekscitita: mi ne ofte estas akceptita en konsulejo!

Ĉirkaŭ la ĉambro estis pendigitaj fotoj de Bjalistoko; inter ili estis foto de la Zamenhof-busto, kiu ornamas unu el la urbaj placoj. La organizantoj disponigis broŝurojn, kaj filmeto (en angla kaj pola lingvoj) varbanta pri la urbo kaj la Podlaĥia provinco estis montrita plurfoje.

Antaŭ ol la urbestro komencis paroli, bela kaj talenta pola pianisto ludis tro multe da muzikaĵoj. Sekve, virino prezentis la parolantojn france, angle kaj pole. Ŝi parolis pri Esperanto dirante ke tiu lingvo estus utila por tia kunveno ĉar mankis « interlingvo ». Tian rimarkon oni aŭdas tiom ofte ke fine, oni sin demandas « Do, kial oni ne uzas

Zamenhofa Festo en Kalgario



Kalgariaj esperantistoj Z-feste fotiĝas

Esperanton? » La paroloj de tiu virino estis la lastaj kiujn mi komprenis dum la tuta vespero: sinjoro Truskolaski ekparolis kaj li tion faris nur pole sen ia traduko. La kunvenintoj, plejparte polaj, ŝajnis esti interesataj per la urbestraj rakontoj kaj lia humuro.

Ĉar estis jam malfrue kaj ĉar mi komprenis nenion, mi foriris antaŭ la fino. Bedaŭrinde por mi, mi ne gustumis la varman bufedon kiu jam odoris apetite je polaj viandaĵoj. Mi revenis hejmen min demandante kiel tiu kunveno, kiu celis konatigi urbon al turistoj kaj al fremdaj entreprenistoj, povis trafi se oni dum ĝi parolis nur pole. Paradokse, tiu-vespere, nur unu ulo komprenis nenion: la delegito de asocio kiu varbas por internacia lingvo...

— Jérôme Frédéric Bouchard



Zamenhofa busto en Bjalistoko

Dum la posttagmezo de dimanĉo, la 14-a de decembro, esperantistoj de Kalgario celebris la naskiĝdatrevenon de nia majstro per festa kunveno ĉe la hejmo de Paŭlo kaj Maria. Nia negrand-nombra sed mult-nacia aro – Allan el Danio/Aŭstrio, Dafinka el Bulgario, Maria el Pollando, Milan el Ĉeĥio, Nikolas el Aŭstralio, kaj Paŭlo la kanadano – babilis, fotiĝis, manĝetis, kaj kantis Zambanajn kantojn (informojn pri tiuj trovu ĉe <http://anthro.ucsd.edu/~dkjordan/es/zamban-uni.html>). (psh)

Nicole kaj Pierre Vojaĝis en Kanado

(el *Inter Ni* n-ro 256, aŭgusto 2007)

Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva, ĉarmaj emerituloj el La Ciotat, vilaĝo en sudorienta Francujo inter Marseille kaj Toulon, vizitis Nov-Skotion dum tri tagoj meze de junio 2007. Ilia filino estas instruistino kaj ili prizorgas ŝian du-jaran infaninon dum la lerneja jaro. Do ili povis ĉi-somere viziti min per la Pasporta Servo, kaj ankaŭ amikojn en Otavo kaj Montrealo per luaŭto. Ili diris, ke ili neniam drinkas vinon, nek la ruĝan nek la blankan. Malgraŭ de tio mi kredis, ke ili vere estas francoj ĉar ili spicas sian babiladon kun francismoj kiel „hu-la-la“ kaj „mi dormis kiel marmoto“ (marmoto estas eta mamulo kiu loĝas en la Alpoj kaj vintrodormas).

La unuan tagon ni vizitis la Artan Muzeon de Nova Skotio. Pierre estas amatora pentristo kaj la pentraĵoj tre interesis lin. Dum ilia vizito al Halifakso, hazarde, grandaj velboatoj el multaj landoj kunvenis en la haveno. Ni ĝuis ilin kaj la urbocentron. Poste ni vizitis Peggy's Cove, tradicia kaj ankoraŭ uzata fiŝkaptista vilaĝo sur la Atlantika marbordo. Nicole kaj Pierre rimarkis, ke ĉio en Kanado troviĝas dise. Oni devas long-daŭre aŭtovojaĝi inter urboj, inter regionoj, inter parkoj, eĉ inter urbetoj. Ni vagis trans la arbaro de Nov-Skotio sur la ŝoseoj, kiuj laŭ ili estas pli larĝaj ol tiuj en Francujo – plejverŝajne ĉar la fervojoj preskaŭ tute mankas ĉi tie.

La duan tagon ni iris al Grand Pré, eta vilaĝo proksima al Golfo Fundy kie en 1755 la Britoj forpelis dise la akadianojn (franc-devenajn koloniistojn) al la britaj kolonioj en Nord-Ameriko, al karibaj kolonioj, kaj kelkajn al Francujo. Tio estis grava historia afero en Nov-Skotio. Pierre kaj Nicole neniam aŭdis pri tio. En tiu epoko, kiam Britujo kaj Francujo batalis por la rego de Eŭropo kaj la mondo, Nov-Skotio estis flanko afero. Por

povi klare vidi, foje oni devas mem rigardi tra la okuloj de aliaj. Nov-Skotio gravas al mi, ĝi estas mia hejmo, sed en la historio kaj la nuntempo ĝi estas eta, flanko afero. Tiu pliklara memrigardo estas alia profito de la Pasporta Servo por la gastigantoj.

Samtage ni vizitis Lunenburgon, urbeton kie la plej granda fiŝkaptista ŝiparo en Nov-Skotio hejmas. Lunenburgo estas ankaŭ monda heredaĵejo de UNESKO. La lignaj domoj kaj butikoj estas bunte farbitaj. Samstrate unu apud la alia estas verdaj, ruĝaj, bluaj, flavaj, brunaj, purpuraj konstruaĵoj kiuj havas kompleksajn formojn kun multaj lignaj ornamaĵoj. Lunenburgo aspektas unike.


La lastan vesperon la lokaj esperantistoj kunvenis, laŭ nia kutimo kiam esperantistoj vizitas. Dek personoj plenigis mian salonon. Kutime en niaj kunvenoj nur unu konversacion sekvas la tuta ĉambro, sed kun dek, ofte ni havis du aŭ tri konversaciojn samtempe je malsamaj flankoj de la ĉambro. Nia grupeto apartiĝis teme.... laŭ politiko, lingvoj, komputiloj, kuirado. Kaj se iu aŭdis ion interesan, tiu aliĝis al alia tema grupeto. Kaj ni iufoje grupiĝis laŭ lingva lerteco. Mi rimarkis tion ankaŭ ĉe NASK en Vermonto. Komencantoj babilis kun aliaj komencantoj, progresintoj kun progresintoj, kaj la spertuloj gregiĝis. Dum la tuta vespero la grupoj ŝanĝiĝis inter si, al du grupoj, poste al tri grupoj kaj denove al unu grupo. Kiam ni havas vizitantojn, niaj kunvenoj estas multe pli interesaj.

— Reni Porter (gastiganto de la PS)

Vojaĝu tra la mondo per la
Pasporta Servo de TEJO!
<http://www.tejo.org/eo/ps>

La ĉi-numeran krucvort-enigmon faris nia membro Don Reble el Edmontono.

Sendu viajn solvojn al la redaktoro de *Lumo* kaj via nomo aperos, apud la solvo de la enigmo, en la sekva numero. Aldone, ĉiu kies plenan solvaĵon alportos al ni la Kanada Poŝto danke ricevos belan artokarton Esperantan.



Ŝlosiloj

(r = radiko; atentu la finaĵojn!)

Transen

- 1 unusona vortero (r)
5 rilatan al bela ruĝa floro
9 geometrie akra (r)
11 malnokto (r)
13 iom blanka (r)
14 helega eksplodanta stelo (r)
17 multposedanta
18 solokaze
20 rigidigaĵo por kolumo (r)
21 plej perfekta (r)
22 bruegado de homamaso
23 pingloarbo de daŭrema ligno (r)
25 parolo mildiganta bedaŭron
26 skriblikvoj
27 posteularo
28 birdodomojn

- 30 honora societo
36 homo de apud Vilno
40 gason de reklam-lampo
41 bezonanta esti aranĝita (arkaika)
44 fordoni, por akiri alion (r)
45 devigi
46 ĉemizbrako (r)
47 vir-aga diablo (r)
48 ligna, orta ujo
51 lumiganta vitra ujo (r)
55 arbusto havanta sarmenton kaj berojn
56 farinta absces-likvon
57 angla volumen-unuo (r)
59 dronigi teron
61 moviĝinta
62 granda subtera truo
68 vesti per vizaĝ-tuko
72 monaĥestro

- 73 faronta rimojn
78 perdintan la gepatrojn
79 administranta regnon
81 vojoj inter arbvicoj
82 larĝega seĝo (r)
83 plilongilon por tablo, ĉeko
84 regula batado, movado (r)
85 troĝua festo (r)
86 movi teron (r)
87 ne prokrastebla (r)
88 resti en aero (r)
89 skeletoj
90 faŝisma germano

Suben

- 1 ĉerpas tra ŝalmo
2 homo de apud Romo
3 superemblemon de kartludo
4 subakve lavu

- 5 perleĝaj povoj
6 grasajn likvojn
7 esplori detalojn
8 migrema homo (r)
9 ruĝa varmego
10 al kiu loko
12 ŝmiris per gluecaĵo
13 bohema danco
15 konforma al faktoj
16 moviĝi por atingi (r)
19 angla pezunuo (r)
21 fremdan kruc-grafemon
24 parto de ĉielarko (r)
29 skuis la animon
31 fiŝarkaptilo (r)
32 siestu
33 tediĝi (r)
34 interplektaĵo, liganta

- fadenojn (r)
35 ne menciita ulo
36 havanta kriplan kruron (r)
37 muzika sono (r)
38 okupojn de grava servado
39 ĉesigi ies dormon (r)
42 grandan laŭ direkto alia ol larĝo kaj longo
43 altmoralajn
48 filmarto (r)
49 fari aŭdeblaĵon (r)
50 narkotaĵo el papavo (r)
51 fari
52 kvantego da akvo (r)
53 komparative
54 hazardilo (r)
55 viro perdinta edzinon
58 pli malgrandaj ol normalaj

- vivuloj
60 troe trinkis alkoholaĵojn
62 larĝbaza botelo
63 mielinsektoj
64 sencele irados
65 malgrandan
66 mordu ĉize
67 ruĝe flava
69 domarego
70 iu agado, aĵo (r)
71 parolorgano
74 paŝiri
75 verda aŭ nigra drupo
76 laŭ glata, pura maniero
77 kavo por mortulo (r)
80 tajli per turnilo (r)

Novskotia renkontiĝo

Antaŭnelonge, mi kaj mia edzino Meredith, ambaŭ loĝantaj en Kalgario, havis la grandan plezuron partopreni renkontiĝon de Novskotia klubo. Ni kunvenis en la domo de Kim Keeble en la vilaĝo Upper Rawdon, proksimume unu horon for de Halifakso.

Kun speciala plezuro ni unuafoje renkontis John Huang. Li estas relative nova enmigrinto el Ĉinio. Li estas komercisto kaj loĝas en Halifakso. Li relernis Esperanton pere de koresponda kurso; lia instruistino estis Kim. John jam tre flue parolas, kun aparte bona prononcado. Sendube atendas lin "kariero" en la hierarkio de KEA!

Kim, kvankam jam 83-jaraĝa, vojaĝas ĉiusemajne al Lower Sackville, antaŭurbo de Halifakso. Tie ŝi gvidas Esperanto-kurson por junuloj en la tiea lernejo.* Iniciatinto de tiu ideo estis John Green, loka esperantisto kaj patro de du el la gelernantoj.

Meredith kaj mi deziras danki ĉiujn ĉeestintojn pro iliaj gastemeco kaj afableco.

— Allan Simon

* Oni povas legi pli multon pri tiu kurso en la artikolo « Nova Esperanto-Klubo en Nov-Skotio », kiu aperis sur paĝoj 6 kaj 7 en numero 1/2008 de *Lumo*. [ndlr]



Ili oktobre kunvenis en Upper Rawdon - de maldekstre: John Huang, Meredith Simon, Kim Keeble, Allan Simon, Bob Williamson.

Kvazaŭ-recenzo de nelastatempa libro

Konsolo de la filozofio. Boecio, tradukis A. Goodheir. Glasgovo: Kardo, 1984; €4.80 (plus sendokostoj) ĉe la Libroservo de UEA.



Lastatempe mi havis la okazon finlegi verkon, kiun mi ĉi-somere akiris en la UK en Roterdamo. Temas pri la traduko de Albert Goodheir de la *Konsolo de la Filozofio* de la

verkisto Boecio – tiu, kiun oni nomas *Boethius* en la angla, *Boèce* en la franca. La traduko aperis jam en 1984, do baldaŭ festos sian kvaronjarcenton; ĝin eldonis la skota eldonejo Kardo, kiu aperigis plurajn verkojn kaj tradukojn de Goodheir. D-ro Albert Goodheir, kiun mi renkontis unu aŭ du fojojn, estis fakulo pri antikvaj studoj, sed pri pluraj aliaj kampoj samtempe. Mi ne komparis lian tradukon kun la latina originalo, sed mi povas certigi ke ĝi ŝajnas senerara kaj bonstila.

Mi parolas pri sufiĉe mallonga verko: la libro enhavas nur 146 paĝojn, kiuj inkluzivas utilan naŭpaĝan enkondukon de Goodheir. La latinan verkon aŭtoris Boecio (Anicius Manlius Severinus Boethius) en 523 p.K., kiam la ostrogota reĝo Teodoriko estis enkarceriginta lin pro ŝtatperfido. Ĝis tiu momento la filozofo estis inter la plej eminentaj homoj de Italujo: en 522 li fariĝis altranga kortegano de la reĝo, ĉar li enoficiĝis kiel 'mastro de la oficoj' (*magister officiorum* en la latina). En la sama jaro liajn du filojn oni nomis konsuloj, kio estis elstara honoro por la patro. Subite, tamen, la etoso ŝanĝiĝis. La reĝo arestis Boecion kaj en la sekva jaro ekzekutis lin; lia bopatro, Simaĥo, kiu sole

strebis lin defendi, suferis la saman sorton.


Evidentiĝas ke la sorto forte batis la filozofon. Kaj ĝuste tian temon traktas la libro: la kompatinda Boecio strebas sin konsoli en sia malliberejo, sin turnas al la Muzoj kaj al fortuna, kaj priplendas la situacion. Filozofio, priskribita kiel bela junulino, intervenas por alparoli lin kaj klarigi al li kial li ne devus priplori sian sorton. Intermiksiĝas klarigaj dialogoj kaj mallongaj poemoj tra ĉiuj kvin libroj de la verko. La dialogoj tre similas al tiuj de Platono, ne surprizinde: Boecio estis nov-platonisma filozofo, tre influita de Platono kaj liaj posteuloj. Ili ankaŭ traktas similajn temojn, ekzemple kial la justeco ŝajne maltriumfas kaj malbonuloj sukcesas. Filozofio klare elmontras (almenaŭ, tiel ŝajnas al Boecio dum lia interparolado kun ŝi) ke malbonuloj ne vere sukcesas: tio nur ŝajnas esti la vero. Malgraŭ eksteraj sukcesoj, iliaj animoj tamen suferas pro la malbonaj agadoj. Iom post iom, en lerte strukturita serio da diskutoj, Filozofio konsolas Boecion.

Mi ne eniru la tutan historian fonon: mi iom diskutis pri la epoko en mia IKU- prelego en Roterdamo, kiu nun haveblas ĉe UEA (en la Aktoj de la Internacia Kongresa Universitato). Mi notu nur ke la reĝo Teodoriko prave suspektis kunlaboron inter iuj senatanoj en Italujo kaj la registaro en Konstantinopolo. La okcidenta romia imperio jam falis en 476 p.K., sed ĉiuj administraj strukturoj daŭre restis, almenaŭ en Italujo, kaj la regantaj gotoj strebis kunlabori kun la restantaj romianoj. Teodoriko sukcesis harmoniigi la situacion iagrade, sed, post la surtroniĝo de Justino la 1-a en Konstantinopolo (518) la situacio malstabiligis: baldaŭ evidentiĝis la ambicioj de lia nevo, Justiniano, kaj iuj okcidentanoj komencis sopiri la romian imperion kaj esperi ke ĝi povus iel rekapti Italujon kaj forigi la gotojn. En tia kunteksto la preteco de Boecio defendi

senatanon, Albinon, kiun oni akuzis pri komplotado kun la bizancanoj, interpretiĝis kiel manko de fideleco al la gota reĝimo.

Povas esti ke tia filozofia verko ne estos laŭ la gusto de ĉiuj. Mi mem certe malkonsentas kun preskaŭ ĉiu argumento, ne estante kredanto je Dio. Cetere, indas noti ke kvankam la verko furore populariĝis en la mezepoko, ĝi enhavas apenaŭ ian ajn aludon al kristanismo: la aŭtoro verkas multe pli kiel pagano ol kiel kristano, eĉ se li ofte parolas

pri Dio kaj pri la boneco de Dio. Probable li ja estis kristano, sed la stilo ne multe spegulas tion. Sed oni devas admiri la plaĉan aranĝon de la dialogo kaj ne eblas, mi opinias, ne kompati la filozofon, kiu atendas sian morton. Temas do pri verko tre humaneca.



— Geoffrey Greatrex

Letero al la redaktoro

Estimata redaktoro,

Mi deziras respondi al du demandoj de Reni Porter en la artikolo pri la Universala Kongreso en Florenco en la lasta numero de *Lumo*.

Reni diras, ke la kongreso estis nepublika, kaj supozas ke la kaŭzo estas sekureco. La klarigo estas multe pli simpla: oni deziras certigi, ke nur tiuj kiuj pagis la kotizon partoprenu la kongreson. Tial oni devas montri la kongresan ŝildon, kiun oni ricevas kiam oni enskribiĝas, por eniri la kongresejon.

Iuj diras, ke aranĝoj devus male esti publikaj, por ke homoj povu vidi ke Esperanto fakte funkcias. Dum la lastaj jaroj, oni organizis kelkajn publikajn eventojn, sed ne eblus organizi la UK se neniu pagus la kotizon!

Reni ankaŭ rimarkas, ke la itala nomo de Florenco estas *Firenze*, kaj demandas ĉu Esperantaj nomoj ne estas variaĵoj de la nomoj en la lokaj lingvoj.

La esperantigo de nomoj de lokoj ne sekvas sistemon, sed la naci-lingva nomo de la loko estas nur unu faktoro. Ankaŭ gravas la internacieco, t.e. la formo aŭ formoj kiuj estas plej oftaj internacie. Tial la lando *Deutschland* ne nomiĝas « Dojĉlando » aŭ simile en Esperanto, sed Germanio, kiu estas pli internacia formo. Same, la lando kiu nomiĝas *Magyarország* naci-lingve estas Hungario en Esperanto, *Shqipëria* estas Albanio, kaj tiel plu.

La nomo de Florenco estas: *Florence* en la angla kaj la franca, *Florenz* en la germana, *Florenca* en la hispana, *Florencija* en la rusa, kaj tiel plu. Estas do klare, ke la Esperanta formo « Florenco » estas multe pli internacia ol estus « Firenco ».



Yves Bellefeuille

Leteroj al la redaktoro estas ĉiam bonvenaj; ili publikigis se spaco permesas, kaj se konsentas la redaktoro kaj leter-verkinto.

Franca skribo inspirita de Esperanto (el *La Riverego* n-ro 90, decembro 2007)

Pri la franca ortografio oficiale decidis la franca Akademio. Oni povus kredi ke la akademianoj diris al si « *Kial fari simple kiam eblas komplike?* » kaj ne esti for de la vero. La akademiano Mezeray eĉ parolis, en antaŭparolo al la vortaro de la Akademio, pri ortografio « *por distingi la klerulojn de la nekulturitoj kaj de nuraj virinoj* ».

Esperanto, kiel provo raciigi la lingvon, estis agnoskita inspiro de almenaŭ unu projekto por raciigi la francan ortografion, la normo Ortograf, kiu kontraŭas la superecon de la ortografio decidita de la franca Akademio.

La movado *Ortograf.net* proponas ortografian normon raciigitan kaj pli fonologian. La sugestita kodo similas al *Ortograf altêrnativ*, kiu estas jam sukcese uzata por doni minimuman memstarecon en legado kaj skribado al tiuj, kiuj neniam povus skribi pro gravaj mankoj. La urbo Montrealo lastatempe proponis version de sia retpaĝaro en *Ortograf altêrnativ*.

La aliĝintoj al la grupo *Ortograf.net* opinias, ke la franca lingvo apartenas al siaj parolantoj kaj ke se tiuj adoptus kaj disvastigus simplan manieron skribi ĝin, ĉi tiu normo mem trudiĝus. La administrado, la edukosistemo kaj la ĝenerala komunumo adaptiĝus. La movado tiel invitas la publikon ekposedi sian lingvon baze de simpla normo anstataŭ vane

kaj pasive atendi partan reformeton de la ortografio per iu aŭtoritato.

Ortograf.net sugestas skribi fonologie ekde nun, aldonante al ĉiuj korespondaĵoj la jenan noton « *J'adèr o standar de l'ortograf altêrnativ - www.ortograf.net* » kiu troviĝas sur la retpaĝo. Ĉi tiu strategio ebligis al la normo rapide disvastiĝi ekde 2006. Ĝi estas la alternativa normo kun plej forta progreso nun.

Ĉi tiu ortografio pensigas pri *Alfonic*, elpensita de André Martinet en la 70-aj jaroj kiel propono por lernejoj aŭ fremduloj malhelpitaj pro timo erari, por doni al ili la rimedon venki tiun timon kaj liberigi ilian esprimadon.

Oni pensas ankaŭ pri la lingvaĵo de SMS, kiu modifas la gramatikan kaj ortografian proprajojn de la franca lingvo kun celo mallongigi la tempon bezonata por tajpi mesaĝon aŭ por mallongigi mesaĝon al maksimuma longeco por SMS-mesaĝo je poŝtelefono. Iuj iras eĉ pli for kaj proponas kreon de franca fonologia alfabeto: *Alfograf* (franca fonologia alfabeto de la movado *ortograf.fr*).

Same kiel Esperanto, ĉi tiuj provoj igi esprimadon kaj komprenadon pli facilaj, kolizias kun la samaj reagoj kaj akuzoj: « *Estas artefarite kaj mekanike, estas perfido al nia historio kaj kulturo, ne estas realigeble, estas malfacile, mi lernos ĝin kiam ĉiuj lernos ĝin...* »

— Mario Périard

Redaktora angulo

Post granda kongreso kiun partoprenis pli ol kvardek kanadanoj, mi esperis ke abundus kontribuajoj pri TAKE 7, sed pasis kvar monatoj antaŭ ol venis eĉ unu raporto. La redaktoro devis do servi ankaŭ kiel kongresa raportisto kaj fotisto! Mi esperas ke la artikolo plaĉos al vi, karaj legantoj, kaj ke ĝi – kaj la raportoj de nia diligenta prezidanto – instigos vin raporti pri viaj spertoj. Sendu viajn kontribuojn al: **Paul Hopkins < hoppaul ĉe gmail.com >**

#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5



Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

ĉiumonate raportas pri politiko, scienco, moderna vivo, ekonomio kaj multe pli.

Ne pri Esperanto sed en Esperanto!

Petu senpagan provekzempleron de MONATO
Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: admin@monato.net

Aere \$ 80 Surface \$ 76 Rete \$ 45.60

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

- Eventoj:** Artikoloj, informoj, intervjuoj pri Esperanto
- Tribuno:** Malkaŝaj opinioj pri diversaj temoj
- Vide el Bruselo:** Lingvopolitika rubriko de Dafydd ab Iago
- Vortoj de Komitatano Z:** Unika primovada rubriko
- Beletro:** Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- Civilizo:** Kia estis, estas kaj estos nia mondo
- Arkivo:** Historio de Esperanto sub lupeo
- Nia Trezoro:** La plej gravaj libroj en Esperanto
- Kore kaj roke:** Muzika rubriko de Flo


Aera abono: \$ 68

Surfaca abono: \$ 60


Elektronika abono (PDF): \$ 19

Podkasta servo: senpage

Por aboni al Monato aŭ La Ondo de Esperanto, sendu ĉekon al
Kanada Esperanto-Asocio
p/a Yves Bellefeuille, kasisto
2372 Haddington
Ottawa Ontario K1H 8J4



LA ONDO de Esperanto



Kalendaro

Regulaj kunvenoj en Kanado:

Edmonton (Alberto): Kunvenoj okazas preskaŭ ĉiun vendredon tagmeze kaj la duan ĵaŭdon de ĉiu monato ekde 19h30. Informoj ĉe <http://esperanto-edmonton.wikidot.com/>

Halifakso (Nov-Skotio): Oni kunvenas proksimume dufoje ĉiun monaton ĉe la hejmoj de grupanoj. Informoj ĉe <http://www.esperanto.ca/eo/halifax>

Kalgario (Alberto): la Kalgaria Esperanto-Rondo kunvenas ĉiun lundan vesperon inter la 19h00 kaj 21h00 ĉe kafejo Second Cup en distrikto Kensington (338 – 10th Street NW). Informoj ĉe <http://esperantocalgary.blogspot.com/>

Montrealo (Kebekio): la lastan vendredon de ĉiu monato (krom julio, aŭgusto kaj decembro) okazas Amika Vespero de ESK en la restoracio Le Commensal (1720 St-Denis) ekde 19h00. Informoj ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites>

Otavo (Ontario): La Esperanto Rondo de Otavo kunvenas du fojojn ĉiumonate ĉe kafejo Bridghead kaj la Universitato de Otavo. Informoj ĉe <http://www.esperanto.ca/eo/ottawa>

Toronto (Ontario): Oni kunvenas ĉiun lundan vesperon ĉe kafejo Timothy's World Coffee ĉe stratoj College kaj Bay inter la 18h00 kaj 20h00. (Escepto: kiam lundo estas feritago la kunveno okazas mardon.) Informoj ĉe <http://www.esperanto.ca/eo/toronto>

Viktorio (Brita Kolumbio): Kunvenoj okazas en North Saanich ĉiun lundon de la 13h00 ĝis 14h00 en la domo de Olga kaj Wally du Temple kaj ĉiun ĵaŭdon de 13h00 ĝis 15h00 ĉe Golfludejo Ardmore. Informoj ĉe <http://esperanto.ca/victoria/>

Esperanto-kunvenoj 2009 (elektitaj):

16-a ĝis 18-a de majo

Toronto (Ontario): 6-a Mez-Kanada Renkontiĝo (MeKaRo). Informoj ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites/>

22-a ĝis 25-a de majo

Sankta Luiso / St. Louis (Misurio): 57-a Landa Kongreso de Esperanto-USA. Informoj ĉe <http://esperanto-usa.org/node/1247/>

29-a de junio ĝis 17-a de julio

San Diego (Kalifornio): Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) ĉe la Universitato de Kalifornio. Informoj ĉe <http://www.esperanto.org/nask/progovereu.php/>

18-a ĝis 25-a de julio

Liberec (Ĉeĥio): 65-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Informoj ĉe http://www.tejo.org/eo/ijk_enkonduko/

25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto

Bjalistoko (Pollando): 94-a Universala Kongreso de Esperanto. Informoj ĉe <http://94uk.bialystok.pl/>

10-a ĝis 12-a de oktobro

Silver Bay (Novjorkio): 16-a Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto. Informoj ĉe <http://www.esperanto.qc.ca/eo/are/>